

NIA VOĈO
Madrida Esperanto-Liceo

San Alejandro 6-4^B-Ext. 28005 Madrid
(Nur poŝta adreso)

Ni kunvenas lunde je la 18,30 en Rodríguez San Pedro 13-3^o-7

Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz

APRILLO 2004

PREMIO ADA SIKORSKA

La premio celas publike agnoski gravan kaj sindediĉan laboron por la bela ideo de esperantismo faritan de meritplena esperantisto en kiu ajn loko de la mondo.

Madrida Esperanto-Liceo proponos por la premio "Ada Sikorska" al Augusto Casquero.

Unue pro liaj personaj rilatoj kun Ada. Li, kiel prezidanto de Madrida Esperanto Liceo, akceptis la geedzojn Fighiera kiam ili venis al Madrido kaj laboris kune kun ili pri la vigligo de la madrida e-movado, kies pinto ili estis dum tiuj ĝi jaroj.

Due kaj ĉefe pro la daŭra laboro por Esperanto kiun li faris kaj plu faras en HISPANIO. (Amaso da hispanaj esperantistoj (ĉefe madridaj kaj valenciaj) konas la lingvon pere de la instruado de Augusto en kulturaj centroj, lokaj grupoj, universitatoj, lingvaj lernejoj, ktp. Li havas la hispanan rekordon pri la organizado de E-kongresoj (unu universala, du naciaj kaj kelkaj regionaj). Dum la jaroj kiam li loĝis en Madrido, li organizis multajn ekster-esperantajn aktivaĵojn (tendumadon, ekskursojn, vojaĝojn, ktp), kiuj kaptis amason da esperantaj simpatiantoj kaj gelernantoj por la kursoj de MEL.

Trie, pro lia laboro EKSTERLANDE: instruisto en Esperanto pri la hispanaj lingvo kaj kulturo; profesoro de la Internacia Universitato de San Marino; organizanto de vojaĝoj en Esperanto tra Hispanio, kiel delegito de Monda Turismo; kaj organizanto de karavanoj al UK-oj por hispanoj.

GRANDA VORTARO Fundación Esperanto

Hodiaŭ, kiam sur la bretoj de la eldonejo ne plu restas eĉ unu sola volumo, ni povas diri ke ĝi elĉerpiĝis. Nur deko da ekzempleroj restas por eventuala "grava" mendo, kelkaj el ili estas en la librejo "Don Libro" de Madrido kaj la libroservoj de HEF, UEA kaj E-Grupoj.

La kialo estas ke preskaŭ la kompleta eldono estis vendita antaŭ la apero por antaŭpagi la kostojn, pro tio la E-Grupoj aĉetis stokon. Nur restas scii kiom da ekzempleroj estas vere venditaj en la tuta mondo.

ESPERANTO EN AMASMEDIOJ

Antonio Valén, kunordiganto de la Granda Vortaro Hispana-Esperanta, estis intervjuita meze de marto en la programo "Cita con Pilar" ĉe Radio 3 (RNE 3)

BIOGRAFIO DE ZAMENHOF

Pedro Garrote kun la helpo de kelkaj volontuloj jam tradukis parton de la verko de Centassi y Masson "La homo kiu defiis Babelon". MEL jam havas la permeson de la eldonejo L'Harmattan por traduki al la hispana kaj eldoni la verkon.

La Valencia-Murcia E-kongreso, laŭ la normala ordo, ĉi jare devas okazi en la provinco Valencia. La valenciaj esperantistoj akceptis la inviton de Cheste okazigi la kongreson en tiu vilaĝo, simbola por nia movado. <http://www.infonegocio.com/augustocasquero/cheste.htm>

La dato estos 29-30 de majo (sabato-dimanco).

HISPANAJ BALOTADOJ

La politika partio "Cultura natural" inkludis en sia programo por la pasintaj balotadoj jena: "Incluimos idioma internacional esperanto, en centros educativos y relaciones internacionales. Más fácil, más de todos, produciendo demostrado desbloqueo y potenciación de la zona cerebral del lenguaje, con apertura al estudio de más idiomas"

6-a Eŭrop-Unia Esperanto-Kongreso. 25-29 aŭgusto 2004. BILBAO. Pli da informoj:
www.geocities.com/esperantobilbao/eue.htm

HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

La Sekretario, Manolo Parra, deĵoras lunde kaj jaŭde vespere (18,30-21,00h), dum aliaj tagoj vi povas faksi aŭ telefoni al 91 446 80 79 aŭ kontakti rete admin@esperanto-es.net
Retadreso de Boletín: bulteno@esperanto-es.net Bv. uzi ĝin nur por Boletín-aj aferoj. Por informpetaj retmesaĝoj uzu info@esperanto-es.net

La organizantoj de EXPOLINGUA denove invitis al HEF ĉijare partopreni la foiron kontraŭ preskaŭ simbola prezo. Pasintan jaron ni pagis por la budo ĉirkaŭ 1.300 eurojn; ĉi-jare ni pagis nur 140. La programo, aparte de la budo por informi, inkluzivis duonhorajn publikajn prezentojn: Tonyo del Barrio prelegis pri Esperanto kaj pri la nova Granda Vortaro Hispana-Esperanta kaj Pedro Hernández prezentis Esperanton laŭ lingva vidpunkto ene de la foira programo "El sabor del lenguaje".

HEF ofertis al la produktistoj de la filmo "El coche de pedales" volontulan helpon por disponigi Esperanto-subtekstojn en la onta DVD-disko de la filmo. Ili jese akceptis la proponon kaj resendis la necesan materialon por la traduko, nome la tutan dialogaron en la hispana kaj la jam faritajn subtekstojn en la angla.

LEGADO DE "El Quijote" EN MADRID

Dum la publika legado de la verko de Cervantes, dum preskaŭ du tagoj, ĉe la Círculo de Bellas Artes de Madrid, kaj dank'al la klopodoj de Tonyo del Barrio, oni legos kelkajn paragrafojn en Esperanto. La evento okazos la 22an de aprilo, jaŭde, je la 18,45 horo. Eble la legontoj estos: Ana Manero, Juan del Castillo kaj Tonyo del Barrio. La pasintan jaron ankaŭ Rafaela Uruña legis parton de la verko ĉe la Casa de Cervantes en Valladolido.

VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO

Niaj konversacia-rondoj okazas ĉiulunde, ekde la 18.30 h, en RODRÍGUEZ SAN PEDRO 13-3º-7 Tel. 91 446 80 79.

Lundon 12an de aprilo je la 19,00 kunveno de la estraro de MEL por proponi al Augusto Casquero kiel kandidato al Premio Ada Sikorska.

La membroj kiuj ankoraŭ ne abonis sian kotizon, povas pagi 12 eŭrojn rekte la lundon en nia konversacia rondo (Rodríguez San Pedro 13-3º-7) aŭ al Esperanto Liceo de Madrid, Banco Atlántico konto 0008/0110/97/1120/404200

ESPERANTO LICEO DE MADRID

Asociación de Utilidad Pública Municipal
San Alejandro 6- 4ºB EXT
28005 Madrid